# *Kubo festas la Internacian Virinan Tagon*

Image not found or type unknown



**Foto: Vladimir Molina**

Havano, mar 8 (RHK) Kun signifa ?eesto en ?iuj sektoroj de la socio, kubaj virinoj alvenas hodia? al la Internacia Virina Tago kun novaj defioj koncerne genron.

Pli ol 300 delegitoj en ?i tiu ?efurbo diskutas ?uste tiujn defiojn en la dekunua Kongreso de la Federacio de Kubaj Virinoj.

Kunvenitaj en la Kongresa Palaco, la partoprenantoj analizas ?is ?i tiu vendredo la rezultojn de la lastaj kvin jaroj de la organizo, elstarigante la atingojn kaj defiojn fronte al la obstakloj truditaj de la usona blokado de Kubo.

En la periodo inter la deka eldono de la Kongreso kaj la nuna, pluraj ?an?oj okazis en la kariba nacio kaj en ?iuj,  kubaj virinoj estis ?efroluloj.

Tiusence indas elstarigi la aprobon de gravaj dokumentoj por virinoj kiel la Familia Kodo, la Nacia Programo por la Akcelo de Virinoj kaj la Ampleksa Strategio por la Anta?zorgo kaj Atento al Seksa Perforto kaj en la Familia Scenaro.

La? la opinio de la ju?istino de la urba ju?ejo de Santiago de Kubo Solanch Sanz, invitita al la evento, okazigi ?i tiun Kongreson en unikaj cirkonstancoj, markitaj de la ekonomia kaj socia situacio, kiun trairas la lando, estas ebleco de patriota reaserto por la federaciintaj virinoj.

Anka?, ?i notis, estas necesa spaco por revizii la metodojn, stilon kaj laborprioritojn de la organizo.

La? la opinio de Sanz, la 8-a de marto estas tago de transcenda graveco por virinoj tra la mondo kaj festi ?in sur la insulo, "kie hodia? ni ?uas venkojn kaj konkerojn la? rajtoj kaj garantioj, reprezentas la fierecon esti kubaj virinoj".

?i memorigis, ke Kubo atingas ?i tiun daton en la kunteksto de lastatempa adopto de la Familia Kodo kaj aliaj juraj normoj, kiuj prezentas novajn defiojn en la konstruado de pli justa kaj egaleca socio, kie la bre?oj de seksa malegaleco, kiuj ankora? ekzistas, estas konsiderinde reduktitaj en la kariba lando.

La insulo, ?i atentigis, ankora? havas la defion da?rigi labori pri la jura kulturo ne nur de kubaj virinoj, sed anka? de kubanoj "por povi ekposedi ?iujn tiujn enhavojn de seksa egaleco, paco kaj harmonio, edukado kun respekto, patrineco kaj respondeca gepatreco, kiu anka? kontribuas por certigi, ke en nia lando ne ekzistas manifesti?oj de seksa perforto.

Nuntempe, virinoj reprezentas 55,74 procentojn de la membraro de la Nacia Asembleo de Popola Povo kaj pli ol 40 procentojn de tiuj kiuj enketas, inter posedantoj kaj helpantoj.

Fonto: PL

---

https://www.radiohc.cu/index.php/eo/noticias/nacionales/349232-kubo-festas-la-internacian-virinan-tagon

# Radio Habana Cuba